



SUNLEVIĜO

KANTOJ DE LA UNIVERSALA
FRATARO

Sofio, 1933

SUNLEVIĜO

KANTOJ DE LA ĜOJO, FRATECO
KAJ HARMONIO

Kunmetis: P. G. PAMPOROV

Sofio, 1933

ESPERANTO-PRESEJO

„KULTURA“

Esperanto-presejo „Kultura“ — Sofia

MUZIKO KAJ IDEALO

La muziko estas universa lingvo de l'anĝeloj kaj ĉiuj estaĵoj komprenas ĝin.

Kiel la gimnastiko necesas por la korpo kaj la matematiko por la menso, tiel ankaŭ muziko necesas por la koro.

Homo estas viva animo, potenca spirito, senmorta estaĵo, filo de l' suno, brila sunradio!

Lumaj pensoj, noblaj sentoj, bonaj agoj — jen la homaj armiloj en la vivo.

La alta idealo estas: „Koro pura kiel kristalo, menso hela kiel la suno, animo larĝa kiel la universo, spirito potenca kiel Dio kaj unu kun Dio!“

Dio estas la suno de la vivo, la suno de la Amo, de la Saĝo, de la Vero. Dio estas nia Patro, kaj ni estas Diaj gefiloj.

La esenco de la vivo mem estas muziko. Nia tuta vivo estas muziko. Niaj pravaj pensoj, sentoj, agoj estas muzikaj. Per la novaj kantoj ni kreas novan vivon, ni kreas la tuthomaran harmonion, ni flugas al nia idealo!

P. G. PAMPOROV

3. DONU, DONU!

Donu, donu, ĉion donu,
 Puran semon de l' tritiko
 Oni semu en la kampon,
 En la kampon en laĵbelan;
 Ke puriĝu dum la vintro,
 Ke ĝojiĝu pri la vivo
 La semita en la kampo,
 En la kampo, sub ĉielo.

Esperantigis: P. G. Pamporov

4. PURAJ VI ESTU!

Puraj vi estu
 Kiel l' abeloj,
 Puraj vi estu
 Kiel la floroj.

Ĝojon, ĝojon por l' animo }
 Portas la pureco. }₂

Lumaj vi estu
 Kiel la steloj,
 Lumaj vi estu
 Kiel la sunoj.

Ĝojon, ĝojon por l' animo }
 Portas la lumeco. }₂

Esperantigis: P. G. Pamporov

5. AŬRORŬ DEL' NOVĀ VIVŬ

Aŭror' mirinda jam aperas,
 Aŭror' de nova vivo hel'
 Majeste ĝi al ni liveras:
 Potencon, ĝojon kaj esper'
 En nova vivo de helec' (2)
 De amo kaj fratec'
 En nova vivo de helec'
 De bono kaj mildec'
 En nova vivo de helec'
 De ĝojo kaj gajec'.

Birdetoj flugas en l' aerŭ
 Kaj kantas dolĉe en la ĥor'
 Pri bela vivo, harmonio
 En granda kaj ĉiela kort'
 En nova vivo de helec' (2) ktp.

Aŭror' vibretas en l' animo,
 Kaj vekas nin per radiet',
 Kiel amanta bon' patrino
 Karesas nin per la ventet'
 En nova vivo de helec' (2) ktp.

Radioj de la Am' verŝigas
Al niaj brustoj varmon, ĝoj',
Per dolĉa kredo nin levigas
Al luma, nova, bela voj'
En nova vivo de helec' (2) ktp.

Ho, ĉi radiojn sendas Dio'
Plenigas ili nian kor'
Kaj flustras dolĉe, harmonie:
Venu al mi — mia trezor'
En nova vivo de helec' (2) ktp.

Esperantigis: P. G. Pamporov

6. REVEKIĜU, FRATO KARA!

Revekiĝu frato kara,
 El profunda dormo vi
 Kaj katenojn de l'centjaroj
 El pied' demetu vi!
 Amo estas la patrino,
 Via forto, via gvid';
 Ĝi starigos vin potence.
 Ĝi donacos viv' al vi!

For el la malliberejo,
 Ĉie lumas jam lumec'
 Paco, ĝojo vin atendas
 Kaj feliĉa estontec'.
 Amo estas via Majstro,
 Vivan forton donas ĝi,
 Amo bonan vin instruos,
 Saĝon lumigados vin.

Kaj al frato vi direktu
 Dolĉan vorton kun mildec',
 Lian koron vi varmetu
 Per la amo, sinserec'.
 Amo estas via savo
 Ĝin alvoku helpi vin
 La animon de sklaveco,
 Baldaŭ liberigos ĝi.

Esperantigis: P. G. Pamporov

7. ROSA GUTO

Rosa guto, mond, lazura,
 Pura, bela kaj malbrua,
 Pac' al vivo paradiz' (2)
 En vi guto, ĉiujn vokas
 Fratojn karajn kaj fratinojn:
 Iĝi ni al vi popol'

Frumatene en la roso
 Niajn korojn ni akvumos
 Kiel vivaj sunradi' (2)
 Kaj ni kantos novajn kantojn
 Kun mirindaj melodioj,
 Bel' ĉielon reeĥi —

Tiel puraj, blank' vestitaj
 Per armiloj forpaŝtitaj
 De la granda Dia Am'
 Novan regnon ni konstruos,
 Dion nian por glorigi
 Ĉiutage en centjar'.

Esperantigis: P. G. Pamporov

8. ARBARAJ NAJTINGALOJ

Ni arbaraj najtingaloj
 Kantas kantojn de l'ĉielo,
 Zorgojn homajn, sentojn
 sklavajn
 For forigas de la tero. }²

Niaj kantoj lum' lumemaj,
 Sunradioj en l' animoj
 Estas viglaj kaj ludemaj)²
 Riveretoj rapidemaj.)²

Jen, jen, aŭdu nian kanton
 Kiel bela font' fluanto,
 Akvostriojn verŝas klarajn,)²
 Ĝojojn portas al ni karajn.)²

De la voĉo bel' gracia
 Ĉiu malbono disiĝos,
 Nova homo inda, juna)²
 Per la kanto revekiĝos.)²

Kantu, cantu najtingaloj,
 Tiel vere ĉiuj vivu;
 Kantu en la montoj, valoj)²
 Tuta mondo kante iru!*))²

Esperantigis: P. G. Pamporov

*) 1—8. kantoj estas el la kantoj de la „Blanka Frataro“.

9. PRINTEMPO

P. G. Pamporov

Alvenas jam Printempo
— Beleco, vivo, suno.
Alvenas nova tempo
De amo, ĝojo, lumo.

En frumatenoj helaj
La ora sun' leviĝas;
En la animoj belaj,
Sunrevoj revekiĝas.

Elkreskas freŝaj floroj
— Ridetoj de l' anĝeloj
Ektremas jam la koroj
— Fontetoj de l' ĉieloj.

Al amo, saĝo, vero
Nin vokas nova suno.
Al ĝojo, viv', libero,
Ni flugas per la lumo.

10. ĈIUTAGE, ĈIUHORE

Ĉiutage, ĉiuhore
 Per vortoj, per kantoj
 Salutataj estu vi —
 Pacaj batalantoj.

Salut' al vi, salut' (2)	
El plena kor',	} 2
Je ĉiu hor'	
Salut' al vi.	

Kiel brila sunradio,
 Kiel mara ondo,
 Nova sento disvastiĝu
 Tra la tuta mondo.

Salut' al vi, salut' k. t. p.

Nova sento disvastiĝu
 Tra la tuta mondo,
 Tuthomaro estu unu
 Familia rondo.

Salut' al vi, salut' k. t. p.

Jugoslava aŭtoro

11. VIVU LA VERDA STEL'

Ni estas gefratoj en tuta la mond',
 Vivu la hel' Esper'!
 Laboru por luma kaj bel' harmoni'
 Vivu la verda stel'!

Ni veku homecon en ĉiu popol'
 Vivu la hel' Esper'!
 Ni metu purecon kaj amon en kor'
 Vivu la verda stel'!

Jam venas belega printempo kun flor'
 Vivu la hel' Esper'!
 Jam kantas la homoj pri paco en ĥor'
 Vivu la verda stel'!

Per amo, per lumo, justeco, liber'
 Vivu la hel' Esper'!
 Ni estu radioj potencaj de l' ver'
 Vivu la verda stel'!

Perlaboris; P. G. Pamporov

12. ALVOKO AL LA SUNO

Vin, kiu sur la ĉielo tronas
 En supersfera beleco kaj ĉarmo,
 Vin, kiu estas la lumo, la varmo,
 Vin, kiu vivon kaj ĝojon donas —
 Vin, Suno, ni salutas!

Vi vokas la florojn el tero profunda,
 Vi vekas la korojn al sentoj ekzaltaj,
 Al agoj plej noblaj, al pensoj plej altaj,
 Al ĝojo senlima, al amo abunda!
 Ho, Suno, ni vin adoras!

Nin trapenetru per viaj radioj,
 Nin supersutu per arda la flamo,
 Ke en ni mem reflektiĝu la Amo!
 Lumo kaj varmo — la vivenergioj
 Ho, Suno, aŭskultu nin!

Citita en „Weisse Fahne“
 Esperantigis: Teo Jung

13. KANTO

Kanto sincera de nia animo,
 Flugu en vaston sen timo
 Kaj komuniku al homoj de l' tero
 Ĝojon de l' sankta espero.

Homojn alvoku al paca laboro,
 Sonu konsolon al koro,
 Kaj en brilanta bluaĵo de spaco
 Laŭte prediku pri paco.

Kantu deziron de homa frateco
 Kaj de l' homar' egaleco;
 Sonu pri amo, pri ĉies libero
 Per la fluganta aero.

Diru ke estas jam inter la mondo
 De kolegaro nun rondo,
 Rondo konstante, senhalte kreskanta,
 Bonon al homoj donanta.

Tiu ĉi rondo la homojn pacigas
 Kaj per laboro kunligas;
 En la ligilo nun estas plektita
 Vigla la kanto invita.

Kanto sincera de mia animo,
 Flugu en vaston sen timo
 Kaj komuniku al homoj de l' tero
 Ĝojon de l' sankta espero!

I. Selezent

14. REVO

Tre potenca ĝi estas, la revo fluganta
Ĉirkaŭita de flora ornamo.
Ĝi similas je nubo ma'luma, tondranta
Ĝi similas je lumo de amo.
Ĝi allogas al maro da bluo, da helo,
Al brilado belega de tago
Aŭ ĝi fulmojn kaj tondrojn de nuba ĉielo
Prezentadas al nia imago.
Aŭ flugante en ia bluaĵo radia,
Super ondoj de maroj ĝi pasas,
Tre belega, pasanta kun son' melodia,
Mallumecon misteran ĝi lasas.
Kaj por ĝi ne ekzistas la spaco, nek tempo
Kaj nenio baranta ekzistas;
Ĝi nin logas al floroj al verda printempo,
El mirinda ĝi sole konsistas.

15. EN KOR' HAVU SUNON ...
 (Hab' Sonne im Herzen)
 de Cäsar Flaschlen.

En kor' havu sunon
 Dum ĉia veter';
 Ĉu ventas, ĉu neĝas,
 Ĉu bruas sur ter'...
 En kor havu sunon
 Dum ĉia ajn ag',
 Kaj lumos lumege
 Plej nokta la tag'.

Sur la lang' havu kanton
 Kun gaja sonor',
 Se pro l' ĉiutago
 Ektimas la kor'...
 Sur la lang' havu kanton
 Dum ĉia ajn ag',
 Kaj pasos rapide
 Plej trista la tag'!

Al aliaj parolu,
 Se premas la sort'
 Sciigu, ke jen la
 Gajiga vin vort':
 Sur la lang' havu kanton
 Kun ĝoja esper'.
 En kor havu sunon,
 Kaj ne mankos prosper'!

Karl Minor

16. TRANKVILA LAG'
(Still ruht der See)

Trankvila lag'! Birdetoj dormas,
Flustrado nur kaj lasta pep';
Nun la vesper' sur la natŭron
Mallevas sin. Ho ĉarma rev'! (2)

Trankvila lag'! Tra la branĉaro
Blovadas jen la dia spir',
Floretoj ĉe la laga bordo
Eĉ klinas sin pro preĝsopir'! (2)

Trankvila lag'! Pacemajn stelojn
Je l' ĉieldom' rigardas mi.
Ho homa kor', kontenta estu,
En dolĉa pac' ekdormos vi! (2)

F. Christanell

17. ABIO VI, ABIO VI.
(O Tannenbaum)

Abio vi, abio vi) 2
Kun foliar' daŭrema!) 2
Vi verdas ne nur en somer',
Sed eĉ dum vintra neĝvetor'
 Abio vi, abio vi,
 Kun daŭra foliaro.

Abio vi, abio vi,) 2
Vi multe al mi plaĉas) 2
Ho kiel ofte ĝojis mi
Ĉe la kristnaska bril' de vi!
 Abio jen, abio jen,
 Vi arbo plej amata!

Abio vi, abio vi,) 2
Jen via boninstruo:) 2
Espero kaj la konstantec'
Konservos forton de junec'
 Abio vi, abio vi,
 Vi scias nin instrui!

Paul Cristaller

18. LA GAJA MIGRANTO
(Wem Gott will rechte Gunst erweisen)
J. v. Eichendorf

Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom'
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon al la hom'

De l' montoj riveretoj fluas,
Alaŭdoj kantas super mi,
Mi ankaŭ gajan kanton bruas
Al la tutmonda harmoni.

Al Dio fidas mi kun ĝojo,
Li zorgas pri la tuta ter';
Li ankaŭ min sur mia vojo
Eterne gardos de l' danĝer'.

L. L. Zamenhof

19. TROVITA

(Ich ging im Walde so für mich hin)

Goethe

Foj' en la arbaron
Mi sola ekiris,
Kaj serĉi nenion
En penso deziris.

Mi vidis en ombro
Jen estas floreto:
Steleto lumanta
aŭ bluokuleto.

Mi volis ĝin ŝiri,
Sed plore ĝi diras:
„Ĉu por ke mi velku,
vi tial min ŝiras?“

Kaj mi ĝin elfosis
Kun la radiketo,
Alportis ĝardenon
Ĉe mia dometo;

En loko trankvila
Replantis karese;
Ĝi kreskas, branĉetas
Kaj floras senĉese.

A. Grabowski

20. KANTO DE L'LIGO
(de W. A. Mozart)

Fratoj, manon donu kore
Kaj senzorge, sendolore
Belan horon festu ni!
Ĉion teran forĵetante,
Daŭru forte kaj konstante,
Nia bela harmoni'!

Al la Dio kantu gloron:
La spiriton kaj la koron
Kial donis la ĉiel'?
Serĉi lumon per vereco,
Serĉi virton per justeco
Estu nia sankta cel'!

Homoj an la oriento,
Homoj en la okcidento,
En la sud' kaj en la nord'!
Alte teni homan nomon
Kore ami ĉiun homon
Estu nia liga vort'!

L. L. Zamenhof

21. ESPERANTUJA KANTO

Mi amas vin, Patrujo mia,
Sen horizont', sen ia lim',
Patrujo mia kaj la via
Pri kiu ĝojas la anim'!
Mi vidas flirti la standardon!
La blankan fonon kun la stel'.
Mi sekvas ĝin sentante ardon,
Pro ĵuro sankta de l' fidel'

Mi amas vin, Patrujo mia,
Loĝejo de diversa ras',
En kiu lingvo Zamenhofa
Ne igas plu en embaras'.
Mi respektadas vian teron
Patrujo kara de l' homar',
Konscias plene mi la veron:
En mondo loĝas nur fratar'.

22. LA ESPERO
L. L. Zamenhof

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko!
 Ne al glavo sangon soifanta
 Ĝi la homan tiras familion:
 Al la mond' eterne militanta
 Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' Espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.
 Forte staras muroj de miljaroj
 Inter la popoloj dividitaj;
 Sed dissaltos la obstinaj baroj
 Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala livngva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
 Nia diligenta kolegaro
 En laboro paca ne laciĝos,
 Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
 Por eterna ben' efektiviĝos.

23. LA TAGIĜO

A. Grabovski

Agordu la brustojn, ho nia fratar',
 Por nova pli vigla jam kanto!
 Ĝi sonu potence de montoj al mar',
 Anoncu al ĉiu dormanto:
 Tagiĝo, tagiĝo radias en mond',
 La ombroj de nokto forkuras el mond'.

Post longa mirgado sur longa la voj'
 Minacis nin ondoj de l' maro;
 Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
 Al verda haven' de l' homaro.
 Post longa batalo, maldolĉa turment'
 La stela standardo jam flirtas en vent'.

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
 Ni estas jam bone harditaj;
 Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal'
 Nek ies perfidoj subitaj:
 Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
 Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
 Benante la Majstron por verko
 Kaj lian anaron, de plej frua hor'
 Fidelan al li ĝis la ĉerko.
 La mond aliiĝos, la temp' pasos for'
 Sed restos eterne pro ili memor'.

La lingvo benata montriĝis al ni,
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela;
Kaj same fidelaj al hejma altar'
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.

En ĉiu mondparto, en ĉiu terzon',
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson'
Do kantas de l' tero ni filoj:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond'
La ombroj de l' nokto forkuras el mond'.

24. LA VOJO
D-ro L. L. Zamenhof

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras,
Simile al stelo en nokta ĉielo
Al ni la direkton ĝi diras;
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoĵ de l' homoj
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan,
Eĉ guto malgranda konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco,
Jen estas la signoj per kies potenco,
Ni paŝo post paŝo post longa laboro
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
Pri tempoj estontaj pensante;
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas kaj semas konstante.
„Ho ĉesu!“ mokante, la homoj admonas,
„Ne ĉesu, ne ĉesu“, en kor' al ni sonas—
Obstine antaŭen, la nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj repurigitaj
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortas jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro
Obstine ĝi paŝas provita, hardita
Al cel' unu fojon signita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan,
Eĉ guto malgranda konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco,
Jen estas la signoj per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro
Atingos la celon en gloro.

25. LA PREGO
 SUB LA VERDA STANDARDO
 D-ro L. L. Zamenhof

Al vi, ho potenca, senkorpa mistero,
 Fortego la mondon reganta,
 Al vi granda fonto de l' Amo kaj Vero
 Kaj fonto de vivo konstanta.
 Al vi, kiun ĉiuj malsame prezentas
 Sed ĉiuj egale en koro vin sentas,
 Al vi, kiu kreas, al vi, kiu reĝas
 Hodiaŭ ni preĝas.

Al vi ni ne venas kun kredo nacia,
 Kun dogmoj de blinda fervoro;
 Silentas nun ĉiu disput' religia,
 Kaj regas nur kredo de l' koro.
 Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
 Kun ĝi la plej vera, sen trudo batala,
 Ni staras nun filoj de l' tuta homaro
 Ĉe via altaro.

Homaron vi kreis perfekte kaj bele,
 Sed ĝi sin dividis batale,
 Popolo popolon atakas kruele,
 Frat' fraton atakas ŝakale.
 Ho, kiu ajn estu vi, forto mistera,
 Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera:
 Redonu la pacon al la infanaro
 De l' granda homaro.

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron.
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos
Ĝi signas la bonan kaj belon,
La Forto mistera de l' mondo nin benos
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos,
Kaj falos por ĉiam, kaj Amo kaj Vero
Ekregos sur tero.

ENHAVO:

Muziko kaj idealo	3
Moto	4
1. Fir fjur fen Tao-bi aŭmen	5
2. Vi diru al mi la veron!	5
3. Donu, donu!	6
4. Puraj vi estu	6
5. Aŭroro de l' nova vivo	7
6. Revekiĝu, frato kara	9
7. Rosa guto	10
8. Arbaraj najtingaloj	11
9. Printempo	12
10. Ĉiutage, ĉiuhore	13
11. Vivu la verda stel'	14
12. Alvoko al suno	15
13. Kanto	16
14. Revo	17
15. En kor' havu sunon	18
16. Trankvila lag'	19
17. Abio vi, abio vi	20
18. La gaja migranto	21
19. Trovita	22
20. Kanto de l' ligo	23
21. Esperantuja kanto	24
22. La Espero	25
23. La Tagiĝo	26
24. La vojo	28
25. La preĝo sub la verda standardo	30

.....
Mendebla ĉe: P. G. Pamporov
poŝtkesto 271 — Sofio, Bulgarujo.